Almati - iama ĉefurbo de Kazahio, la ununura urbo kun miliono da loĝantoj, kaj la dua plej granda metropolo en Centra Azio (post uzbekia ĉefurbo Taŝkent). Ĝi estas la kultura ĉefurbo de Kazahio. Estas multe da verdaĵo en la stratoj, kulturaj kaj bonkleritaj homoj. En la somero oni povas vidi geknabojn sur bicikloj kaj eĉ stratmuzikistojn. Kompreneble, tio ne estas Eŭropo, sed ĝuste - ne jam Azio. La plej interesaj lokoj de Almati estas ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Jen la plej famaj objektoj: Medeo - la giganta glitejo, situanta en pitoreska motfendejo, Ĉimbulak skiejo, Ĉarin-kanjono kun dukilometra valo, kun rokoj kaj ŝtonoj de nekutima formo. La Granda lago de Almati estas pitoreska akvorezervujo 20 km sude de la urbo. Lokita apud ĝi Tien-Ŝan Astronomia Observatorio, kien vi povas iri kaj observi per teleskopo la stelplenan ĉielon.

La plej okcidentan urbon **Atirau**, oni ofte nomas 'La petrolo ĉefurbo de Kazahio'. Hodiaŭ Atirau havas pli ol 400 eksterlandajn kaj internaciajn firmaojn, implikitajn en la petrolan industrion. Ĉi-tiu urbo estis la unua, kien en la 1993 venis eksterlanda kapitalo. Tra la jaroj draste elkreskis eltrovo de la hidrokarbonataj produktaĵoj, aperis multaj projektoj, kiuj estas vaste konataj ekster limoj de nia lando. Ankaŭ multe pli pozitive ŝanĝiĝis vivo de la urbanoj. La sekva problemo solvenda por la urbanoj - krei entreprenon por profunda prilaborado de nafto kaj gaso, liverante por la monda merkato ne nur hidrokarbonan krudmaterialon, sed ties

La rakonto pri Kazahio

altkvalitajn produktojn.

Taraz. Unu el la malmultaj vere antikvaj urboj de Kazahio. Ĝi konservis plurajn interesajn konstruaĵojn: du mezepokajn maŭzoleojn, antaŭnelonge elfositajn de arkeologoj, moskeon kaj banejojn de la XX jarcentkomenco.

Ŝimkent estas komforta, varma kaj verda urbo ĉe la suda limo de Kazahio. 10 km oriente de Ŝimkent troviĝas la vilaĝo **Sajram** kun kelkaj maŭzoleoj, moskeoj kaj minaretoj de la mezepokaj konstruaĵoj.

Turkestan. La urbo estas konata pro siaj kelkaj unikaj arkitekturaj monumentoj. La plej interesas Maŭzoleo de Ĥodĵa Aĥmed Jassau, listigita kiel Monda Kulturheredaĵo de UNESKO. Ĝi estis konstruita sur la tombo de saĝulo kaj filozofo Jassau per ordono de Tamerlano. Grandegan kaj majestatan konstruaĵon de la maŭzoleo (alteco - 44 m, diametro de la ĉefa kupolo - 22 metroj) oni povas konsideri kiel la ĉefan arkitekturan historian objekton de Kazahio.

En **Uralsk** stratoj, domoj kaj preĝejoj gardas multajn rememorojn de la rusa historio, precipe de la Kamparana Milito de la 1773-1775. Ekzemple, tie estas la domo en kiu loĝis Jemeljan Pugaĉjov, la eklezio, kiu estis protektita de la trupoj el la ribelaj kozakoj kaj multaj aliaj vidindaĵoj. En la centro de Uralsk bone konserviĝis atmosfero de provinca urbo de la Rusa Imperio.

En Kazahio, vi povas spekti la plej bonajn trajtojn de la azia nacia karaktero: ĉi-tie ĉiam oni bonkore gastigas homojn. En Kazahio estas bonega kuirarto: **beŝbarmak**, **kuirdak**, **boursak**. En ajna restoracio vi povas ĝui ankaŭ eŭropan kuirarton, sed cetere, - ajnan. En la urboj troveblas normalaj kafejoj, rapidmanĝejoj de la okcidenta tipo kaj multaj similaj.

Nun - iom pri kazaĥa gastemo. Jes, la kazaĥoj estas tre gastamaj homoj. Unue oni regalas gastojn per **ŝubat** aŭ **ajran** (speciale preparitaj trinkaĵoj de ĉevalina lakto),

kaj poste – per teo kun lakto aŭ kremo, **boursak** (fritita pasto), sekvinberoj, **irimŝik**, **kurt** (nakaŭ laktaĵoj). Poste sekvas ‘malgrandaj’ viandaĵoj (ekivalento de eŭropa aperitivo!). Sur ajna tablo devas esti farita el tritika faruno platkukoj. En ajna epoko ornamo de kazaĥa nacia tablo **dastarĥan** kaj plej ŝatata plado de kazaĥoj estis viando ‘kazaĥmaniere’. Viando kutime estas kuirita per grandaj pecoj. La mastro tranĉas la viandon per grandaj pecoj, regalante ĉiun gaston. La plej estimata gasto ricevas speciale kuiritan ŝafan kapon. La gasto devas dividi la kapon inter la ĉetablaj gastoj, traktante certajn regulojn de la ceremonio, kiun diktas la antikva kutimo de respekto de la gastoj: maljunuloj, infanoj, proksimaj kaj malproksimaj parencoj.

La ĉefa nacia plado de kazaĥoj estas **beŝbarmak (kvin fingroj)**. ‘Beŝbarmak’ estas farita de ŝafida, bova kaj parte - de ĉevala viando. La aroman viandon oni manĝas kun maldikaj kuiritaj pastopecoj. La bonega ‘suplemento’ por la plado estas koncentrita aroma vianda buljono – **sorpa**. Ĉe la fino de la manĝado sekvas ĉevalina lakto, kaj poste denove - teo.

La sinteno al vojaĝantoj kaj vizitantoj de Kazahio estas trankvila kaj bonkora.

Kazaĥa nacia valuto nomiĝas **Tenge**, kiu estas lanĉita la 15 de novembro 1993.

Kazahio kun ĉiuj karakterizaĵoj de lia politika sistemo kaj nacia pensmaniero ĉiujare fariĝas pli kaj pli eŭropa lando: butikcentroj, bankaj aŭtomatoj, altrapida interreta aliro de interreto, grandaj kaj komfortaj busoj kurantaj laŭ horaro, kaj ĉiuj aliaj atingoj de civilizo. (Nu, kompreneble, multe da belegaj knabinoj sur la stratoj!) Kelkaj sciencistoj metafore asertas, ke Eŭropo estas barita oriente de la Pacifiko kaj sude de la Ruĝa Maro (tiusence, ke Rusio kaj Israelo per la ĝenerala pensmaniero estas sufiĉe eŭropaj landoj). Verŝajne, Kazahio povas ankaŭ esti laŭgrade inkluzivita en ĉi tiu spaco.

Ekzistas multaj eblecoj veni al Kazahio.

Oni povas veni per aviadilo, trajno, aŭto, buso, biciklo aŭ marŝante.

Bonvenon al Kazahio!

Kandidato (1) pri filologa scienco, membro de la Ĵurnalista Unio, profesoro Sanija I. Kamelova (Atirau, Resp. Kazahio) (esperantigis Ruslan Mavljudov) (1) en kelkaj landoj. "kandidato" estas universitata titolo



Naskiĝo de la pomo « Esperanto »

Francis kaj Monique Bernard loĝas en izolita domo sur la montpasejo de Coperlac [Koperlak], sur la altebenaĵo Mejean [Meĵan], komunumo de Mas Saint Chély [Mas Sent ŝeli], apud Sainte Énimie [Sent Enimi] en Lozero.

Antaŭ 15 jaroj, ili venigis kamionojn de terforigo por plenigi mallongan deklivon, sur kiu kreskis heĝo, je 900m altitude.

La jaroj pasis..... Vepro invadis la tuton.... En la jaro 2015, je la printempo, elirante el vepro ili ekvidas florintan pomarbon !!!

Kiajn fruktojn ĝi produktos ? Je la rikolto ili ĝojis malkovri kvin belajn ruĝajn fruktojn... restas scii ĉu ilia gusto estas harmonie kun la beleco de la fruktoj... ho jes !.... sukera, acideta.... Ĉu ĝi konserviĝas longtempe ? Ili konservis unu en fruktejo ĝis januaro. Ĝi konservis sian guston.

Ili komunikis sian malkovron al Emmanuel Rolland

Ambaŭ prizorgis kune la revuon Esperanto-Info. Ili invitis Emmanuel al la ĝenerala asembleo de la asocio. Tiu ĉi alkroĉis sian ruldemon malantaŭ sian aŭton por trapasi kelkajn tagojn loke kaj viziti la gorĝojn. Nun Céline [Selin], ilia filino, iĝis redaktistino ĉe la gazeto.

Je la rikolto, per interreto, ili sendis foton de 3 pomoj. Emmanuel ĉarmigita tuj imagis ilian reproduktadon . Ĉu tio ne estas mirinda saltotabulo por esperanto, la ĝardeneto de la lernantoj kaj la Ŝategantoj de Pomo en Quevert.(urbeto apud Dinano)?

Li komunikis la novaĵon al siaj esperantistaj amikoj : Philippe Stride, Émile Mas, Henri Masson, doktoro Denis-Serge Clopeau, ktp. kaj ankaŭ al Jean-François Aubert kaj Jules Lebreton respektive prezidanto kaj greftada demonstristo ĉe la « ŝategantoj de pomo ».

« Francis, vi nomu tiun pomon..... » Post iom da tempo, li decidis nomi ĝin « Esperanto », la pomo de la espero kaj kial ne konkorda pomo ?

Francis, estus bone ke vi sendu greftaĵojn al mi. Vi prenas pakaĵon, vi glitas plastbotelon de 1,5 litroj en la pakaĵon kaj vi protektas la greftaĵojn per humida papero ».

La pakaĵo alvenis bonstate fine de januaro 2016 ĝis la Chapelle de l'Iff. [Ŝapel de l'if]

La greftaĵoj enigitaj en la humida grundo de ĝardeno, norde, malantaŭ muro, atendas siajn bazotrunkojn.

Jean-François kaj Jules estis informitaj. Emmanuel petis de Francis sendi al li fotojn de la vepra arbo, ĝi altigas ĉirkaŭ 3 metroj, kaj foti sian edzinon antaŭ la pomarbo por aperigi altecon kaj amplekson.

Emmanuel, antaŭ enigi greftaĵojn en la grundon, kuŝis ilin sur blanka paperfolio. Post kiam li desegnis konturon de partoj je unu kaj du jaroj per nigra kaj ruĝa feltkraĵono, li fotis kaj sendis fotojn per interreto al ĉiuj amikoj.

Dimanĉon, la 7an de februaro, estos la greftaĵa foiro en Quevert (fr). Ĝis tiu momento ĉiuj pripensos strategion por reprodukti, amasinformi kaj disdoni greftaĵojn de la nova pomo « Esperanto ».

La asocio « Ŝategantoj de pomo » aĉetas centojn da bazotrunkojn MM 106 ĉe la valo Loire. Ili vendas ilin po 2 eŭroj al aĉetantoj. Emmanuel proponas al siaj amikoj interesitaj veni al la Chapelle de l'Iff por transplanti MM106 en kvin litraj sistemoj. « ni greftos kune, ŝirmite de la pedagogia plastforcejo, ene de la bieno « la ĝardeneto de la lernantoj ». Tiuj, kiuj deziras povos kunporti unu aŭ du greftaĵojn, la aliaj povos resti pli longtempe en la forcejo. Emmanuel zorgos pri ili kaj de tempo al tempo akvumos ilin.

Li sendos ĉion per interreto al sia amiko Olivier Dadure, kiu prizorgas asocian blogon « *le petit jardin des écoliers* ». Ĉiuj interretanoj povos sekvi la disvolviĝon de la afero. Emmanuel de tempo al tempo (monate) fotos la arbetojn.

Ni esperu ke ni havos multajn sukcesojn pri tiu bela aventuro... Poste ni povus disdoni greftaĵojn dum foiroj kaj poŝtendi ilin al tiuj, kiuj dezirus posedi pomarbon « Esperanto » en sia ĝardeno.

Estas loko por starigi belan sinergion ĉirkaŭ la pomo de la konkordo inter la « Ŝategantoj de pomo », « la Ĝardeneto de la Lernantoj » kaj la esperantistoj ĉu ne ?

Ĉar la Ŝategantoj estas tre interesataj, Emmanuel petis de Francis kaj Monique alian pakaĵeton !

Bonan jaron 2016... Ni semu kaj la planedo rejniĝu.

Emmanuel Rolland

(ora kaj arĝenta medalo ĉe la konkurso Lépine en 1993 kaj 1996, promociita kavaliro laŭ la merita ordo en 2015 de la ekologia ministrino Ségolène Royal)

Armor-Esperanto kaj Klubo de Guingamp

Sabaton, la 5an de marto, post la jarkunveno de Armor Esperanto matene, okazis ĉetabla babilado kaj Zamenhofa festo, en agrabla etoso.

Lernantoj el diversaj kluboj esperante rolludis, kantis, kaj prezentis sian laboron...

Temis pri humuraj rakontoj, fripona kuracisto, belegaj fiŝoj de stranga artistino, parolado pri klimato (grava temo post la 21a konferenco en Parizo)...

Tekstoj estis tradukitaj aŭ skribitaj dum kursoj en Guingamp, Lannion, Peumerit Quintin, Plouézec, Dinan, Ploubalay kaj Saint Briec.



Eĉ Aleksandro Melnikov, nia gasto kiu turneas en Bretonio, partoprenis...kiel bela maristo !



Posttagmeze, Jean Claude ekkriis « Venu ! Venu ! » ĉar grava rendezuo atendis nin : estis momento por skajpumi kun eksterlandanoj !

Estis bonega sperto, ĉefe por komencantoj kiuj unuafoje povis aŭskulti kaj kompreni samideanojn el aliaj landoj. Ni fakte mondscale vojaĝis sur nia seĝo, en kelkaj minutoj :

Unue, ni renkontis Michaël Bronstein, el Rusio, kiu surprizis nin per bela tradukita kanto « Adieu Paris »

Ni interparolis ankaŭ pri la venontaj someraj Pluezekaj renkontiĝoj kie li gvidos kurson.

Poste, ni vidis Juncĵo, el suda Koreio, kiu iomete klarigis al ni novajn metodojn por sanigi homojn per grenoj, sed ne nur.



Fine, ni ĝoje retrovis nepalajn amikojn kiuj jam ĉeestis en Pluezek aŭ UK en Lille, Narendra kaj Rajani Bhattarai, poste Poŝraj.

Ĉiuj el ni, kiel Gaby, nia esperantista patrino, ege ŝatis tiujn momentojn, kiam ni esperante vivas kaj spertas la lingvon.

Dank'al Alain G., fotisto dum la tuta tago, ni povas memori kelkajn elektitajn momentojn en Saint Briec.

Murielle Caré

En Guingamp

La klubanoj babilas pri tre diversaj temoj de sia vivo.

Ekzemple, Claudine rakontis kaj montris fotojn, pri Barcelone kaj ĝiaj konstruaĵoj de Gaŭdi, post feria tempo. Hubert vizitis en Parizo ekspozicion Chagall; Anne retrovis artikolon entenantante fotojn de tiu ekspozicio. Tiam, Jean-Pierre, kiu vivis longtempe apud Chamonix, parolis pri la verko de Chagall en preĝejo de Plateau d'Assy. Li gvidis multajn turistojn, kaj nun interesigis ankaŭ nin pri ĝia konstruaĵo kaj ornamaĵo dank'al famaj artistoj de la 20a jarcento. Kati parolis pri edziĝfesto de sia filino (kaj regalas nin laŭ nia frandema kutimo, kiam okazas feliĉa evento!). Anne sukcese reklamis pri filmo « Demain ». Martine malkovrigis siajn plej ŝatatajn legadojn, inter kiuj « la butonmilito » esperantlingve (el la kesto de Armor-Esperanto-libroj), ktp....

Tiu partopreno de ĉiuj riĉigas ĉiujn!

Ni ĝoje enscenigis kelkajn « Perlojn de kuracista ĉambro », el la libro verkita de Edmond Rébillé, sed ankaŭ el la laborvivo de niaj du emeritaj flegistinoj! por sketĉumi okaze de jarkunveno de Armor-Esperanto, la 5an de marto.

Anne Désormeaux

ŜLUMP de Hans Herbert GRIMM

Ĉu vi legis Ŝlump-on ?

Jen la demando skribita sur reklamaj broŝuroj por altiri la atenton de legontoj, kiam anonime aperis la libro en 1928. Pro la tono de la libro, la aŭtoro timis perdi siajn vivrimedojn. Nur kvinmil kvincent ekzempleroj vendiĝis, eble ĉar iom poste aperis « En okcidento nenio nova, » de Erich Maria REMARKE, kiu vekis grandan entuziasmon, vendiĝis po dek mil ekzempleroj tage. Ŝlump ne estis rimarkita de la pacemuloj. La nazioj ĝin rimarkis kaj bruligis. H.H. GRIMM kaŝis la manuskripton en muro de sia domo, en Altenburg, kie li instruis.

La rubando ĉirkaŭanta la libron reliefigas tiujn tri vortojn: bruligita, forgesita, retrovita. (la franca traduko estis deponita en oktobro 2014)

Do, miavice mi demandas al vi « Ĉu vi legis Ŝlump-on ? »

Eble vi scias nenion pri ĝi, ankaŭ mi sciis nenion, ĝis kristnasko 2014 kiam mi ricevis ĝin kiel donacon.

Kiu estas Ŝlump?

Li estis deksepjara kiam komenciĝis la milito en 1914. Emil Ŝulz, la ĉefa persono en la libro, estis gaja knabo, kiu ŝatis amuzi siajn kunulojn kaj ridigi ilin. « Iam oni instalas budojn sur la placo okaze de pafado al la kolomboj dimanĉe. Emil faligis sian tekono kaj grimpis sur unu el ili. Kriegante, la knabaĉoj ĵetis sur la straton ĉion kapteblan per siaj puĝoj. Sed la malfeliĉo jam alproksimiĝis. Policisto kaptis Emil-on per la jako kaj hurlis : « Speco de ŝlump ! » Eble li volis diri « speco de knabaĉo » aŭ « speco de ŝnok ». Emil ricevis bonan skurĝadon kaj hejmeniris plorkriante. De tiam ĉiuj nomis lin Ŝlump kaj tiel estis por la tuta vivo. »

Ŝlump komencis la militon kiel administranto de tri francaj vilaĝoj, ĉar li iom parolis la francan lingvon; lia « komandantejo » troviĝis en unu el ili, precize en gastejo-trinkejo. Ŝlump rapide amikiĝis kun la gastejestroj, havis bonajn rilatojn kun ĉiuj. Foje li estis iom tro fida, eĉ naiva, sed plejofte li bone elturniĝis, plaĉis al la junulinoj malavaraj je ridetoj. Li preskaŭ forgesis, ke li estis soldato.

Sed li travivis ankaŭ longajn momentojn en la tranĉeoj. Priskriboj de bataloj, de mortintoj, de vunditoj ne mankas, kiel en ĉiuj primilitaj libroj.

Li mem estis vundita, restadis en hospitalo, tie renkontis multajn novajn konatojn : iu venis de Finnlando, alia de Italio, alia de Flandrio.... Diver-

saj originoj, diversaj travivaĵoj kaj aventuroj !

Ankaŭ Ŝlump ŝatis rakonti, « li havis la kapon plenan de primokaĵoj kaj ŝercoj, kaj li amuzis ĉiujn en la vunditejo ». Ĉefe kiam li rakontis al franco, kiel en Germanujo oni kaptas ursojn. « Ni havus dekoble pli da soldatoj se la lupoj ne vorus tiom da infanoj... ». Tiam li klarigas, kiel oni uzas mielon. (sed mi konsevas la sekreton!). Unu el la aŭskultintoj » ridegis kaj miris ke la francoj estas sufiĉe stultaj por kredi tiajn fantaziaĵojn ». Jen eble la nuraj vortoj malbonaj kontraŭ la francoj. Ŝlump estis pacema, kiel la aŭtoro kiu naskis lin.

La aŭtoro: Hans Herbert GRIMM (1896-1950)

Tiu doktoro pri filozofio instruis la germanan kaj la francan lingvojn en sia urbo Altenburgo. Aperigante sian libron, li volis resti nekonata: tio eble estas la kaŭzo de la ne bona sukceso.

Li deziris trairi la nazian periodon nerimarkite, tial li aliĝis al la Partio laborista germana nacia-socialista (NSDAP). Li partoprenis en la dua mondmilito, kiel interpretisto sur la okcidenta fronto. Poste pro sia aliĝo al nazia partio, li ne plu rajtis instrui, malgraŭ favoraj atestaĵoj celantaj montri ke li ne estis nazio, sed male. Vane! (Altenburgo tiam troviĝis en GDR.) Somere 1950 li estis vokita ĉe la Administracio. Kio okazis ? La libro ne diras. Mi legis nur, ke komence de julio, probable la 7-an, dum lia edzino butikumis, li mortigis sin.

La franca traduko de la libro estis farita de Leïla Pellissier kunlabore kun Goethe-Instituto (2014) En multaj leteroj, H.H. GRIMM esprimas deziron de soleco, de rezistado, sian admiron por la francoj kaj por Francio. « Kiam Dio kreis la francinojn, li unue trinkis botelon de burĝona vino. La junaj francoj estas la plej inteligentaj. Ili ekstaras meze de strato kaj primokas ĉiujn. », li skribis al sia patrino.

Mia konkludo : jen leginda libro

N.B. Jen detalo interesa. Ŝlump renkontis soldaton-filozofon (kies opinioj ne kongruis kun la ŝlumpaj)

« Necesas ke multaj mortu. Sed sciu ke la grandeco naskiĝis nur el suferoj » Ŝlump miris ke tia homo restis tie kviete, anstataŭ kuraĝe kuri al la fronto. Sed la filozofo bezonis tempon por cerbumado: li estis plananta lingvon internacian por la estonta unuigita Eŭropo, kaj li bezonis ankoraŭ kvin jarojn, li esperis ke la milito daŭros tiom longe, ke li havu tempon finprepari « Europarozn »

Frédéric Le Magadure

El la klubo de Peumerit-Quintin



Alain Bournel, nia Esperanto instruisto, loĝas en Peumerit-Quintin

Li estas afablega sed atentu...

Li severegas se la gelernantoj ne lernas la lecionojn.

Granda evento en Bretonio-centro

En la vilagxeto « Peumerit-Quintin », Jean-Marc kaj Chantal lernas la esperantan lingvon de unu jaro kaj duono, ĉiun merkredon.

Ĉu la esperanta lingvo kunigas popolojn ?

Mi opinias jes ! Ĉar la dekduan de decembro 2015, Jean-Marc kaj Chantal geedziĝis.

Dum belega bretona tradicia edziĝfestoj, ni dancis, kantis, trinkis ktp...

Bondezirojn al la junaj geedziĝantoj trandonas la klubo.

(Kaj multe da esperantistidoj....eble !!!....)

La klubo de Peumerit.



20-aj Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek



PLUEZEK 2016

Festu kun ni, gaje, nian 20an
datrevenon dum la

2a tutkelta kongreso

En 2016, jam 20 jaroj estos for, ekde la unuaj pluezekaj renkontiĝoj. Iomete antaŭ la 21^a jarcento, kelkaj esperantistoj el Bretonio deziris, kaj plibonigi, sian esperantan lingvon, kaj samtempe malkovrigi al aliaj esperantistoj la belan ĉarmon de somera Bretonio.

Tial eta esperantista skipo klopodis por organizi vilaĝajn amikajn renkontiĝojn en Pluezek. Tuj la urbestro estis favora al la ideo kaj permesis uzi la vilaĝan festohalon kaj lernejon dum unu semajno, tute senpage. Tiu eta esperantista miraklo daŭras ekde 20 jaroj kaj nun, entute, pli ol 2000 personoj malkovris Pluezekon somere dank al esperanta amikeca reto....

En August 2016, ni festos gaje nian 20an datrevenon zorgante samtempe pri la

2^a tutkelta kongreso. Sed kio signifas por ni 'tutkelta'? La unua tutkelta kongreso okazis en Skotlando kaj pluraj el nia pluezeka asocio kaptis la ŝancon malkovri, esperante, keltdevenan kulturon el Skotlando. Per tiuj tutkeltaj kongresoj, ni el Skotlando, Kimrio, Irlando, Galicio kaj Bretonio deziras malkovrigi al esperantistoj la spurojn de keltaj kulturoj kiujn ni, ĉiutage & plezure, gustumas en niaj marbordaj regionoj. Tial, partoprenante en nia 2^a tutkelta kongreso, vi malkovros gaje :

- La senŝeligadon de bretonaj fazeoloj 'coco paimpolais' kiujn ni poste kune gustumos...
- **La sakŝalmistojn de St Briec** kiuj muzikumos kun ni sabate tra la pluezekaj stratoj por konatigi kaj emfazi la esperantistan amikecon.
- Ĉiutagan tutkeltan klasĉambron estratan de Kimro Bill Chapman
- La bretonan sanktulan monteton de Carnoet kun pli ol 60 grandaj stonaj statuoj kaj kiu intencas ricevi ĝis 1000 stonaj statuoj de keltaj sanktuloj
- Ĉiutagajn tutkeltajn atelierojn (keltaj desegnoj, kantoj, vestaĵoj ...)
- Bretonajn bierejojn kaj bretonajn bierojn, brandojn , ktp ...
- Multajn tradiciajn pluezekajn agadojn (esperantaj kursoj, atelieroj, bretonaj manĝaĵoj, marbordaj turismadoj, ..)
- Diversaj esperantaj agadoj de niaj keltaj kuzoj.
- **Veran grandan Fest Noz** por esperantistoj kaj turistoj kiu okazos vendrede por dance fermi niajn renkontiĝojn .

Bretonio estas fiera pri sia kelta heredaĵo. Venu malkovri ĝin pere de Esperanto dum tiu 2^a tutkelta kongreso de la

13^a ĝis la 19^a de Aŭgusto 2016.

Vizitu la retejon : www.pluezek-esperanto.fr

ESTU BONVENAJ EN BRETONIO!

20èmes rencontres internationales de Plouézec



PLUEZEK 2016

Venez fêter avec nous le 20eme anniversaire des rencontres de Plouezec en participant au 2eme congrès interceltique d'Esperanto

En 2016, cela fera 20 ans que nous organisons, chaque été, des rencontres d'Esperanto sur la petite commune costarmoricaine de Plouezec, à côté de Paimpol. Jamais, la poignée d'irréductibles esperantistes bretons à l'origine du projet, n'aurait imaginé que les rencontres internationales de Plouezec attireraient plus de 2000 esperantistes pendant 20 années. Ce fut pourtant le cas, grâce à l'implication de la commune et de beaucoup d'esperantistes bretons qui ont permis de faire découvrir le charme de la Bretagne côtière dans l'ambiance amicale et festive chère au mouvement espérantiste.

Du 13 au 19 Aout 2016, nous profiterons de ce 20 eme anniversaire pour organiser, durant la meme semaine, le 2eme congrès interceltique d'Esperanto. Mais que désigne ce terme 'interceltique' ? Le premier congrès interceltique d'Esperanto a eu lieu en Ecosse et plusieurs Esperantistes de Plouezec, ont profité de cette occasion pour découvrir, pour la première fois, la culture écossaise et son fameux Whisky !

Par l'intermédiaire de ces congrès interceltiques d'Esperanto, les Esperantistes d'Ecosse, d'Irlande, du Pays de Galles, de Gallice et de Bretagne ambitionnent de faire découvrir des aspects de la culture celtique qu'ils ont reçu en héritage, tout en profitant de l'ambiance amicale et festive du monde de l'esperanto.

Ainsi, en participant au 2nd congrès interceltique d'Esperanto à Plouezec, vous pourrez découvrir par l'Esperanto :

- L'écosage traditionnel des cocos paimpolais que nous mangerons ensuite avec plaisir ensemble en essayant de ne pas krokodiler !
- **Le pipe band de St Briec** qui nous aidera à animer les rues de Plouezec le Samedi d'arrivée pour faire connaître ces rencontres interceltiques d'Esperanto.
- Une classe journalière d'Esperanto, animée par le gallois Bill Chapman , dédiée aux cultures celtiques & aux expériences vécues à travers les voyages d'esperantistes issus des régions celtes.
- La vallée des saints de Carnoet où le mouvement associatif breton a commencé à héberger plusieurs dizaines de statues monumentales en granit de saints bretons.
- Des ateliers en esperanto dédiés à la culture celtique (dessins, habits, instruments de musiques, vêtements, etc ...)
- Des brasseries bretonnes, de la bière bretonne, du chouchenn & du calva traditionnel fermier ...
- Les activités habituelles des rencontres de Plouezec (cours multi niveaux d'Esperanto, ateliers, repas en commun, sorties touristiques...)
- Et, pour finir, vendredi soir, lors de la cloture, un **grand Fest Noz**, ouvert aux touristes & esperantistes avec de bons groupes de musique bretonne traditionnelle. La Bretagne est fière de son héritage culturel celtique. Nous vous proposons donc de venir le découvrir lors du 2nd congrès interceltique d'Esperanto qui se déroulera à Plouézec ,
-

du 13 au 19 Aout 2016.

Visitez le site : www.pluezek-esperanto.net

Novaj aranĝoj 2016



TURISMA SEMAJNO 2016 La Luaro laŭ fluo de la vortoj (12/17 junio 2016)

Catherine Kremer kaj Jannick Huet proponas al vi, scivolemaj Esperantistoj, post nia sukcesa ekskurso antaŭ la UK en Lille, novan turisman programon en Luar Valo:

www.gresillon.org/s1

Ni vizitos per profesia ĉiĉeronado en Esperanto ne nur famajn Renesancajn Kastelojn sed ankaŭ rezidejojn de verkistoj Ronsard, Rabelais, Balzac kaj Leonardo Da Vinci.

SOMERAS

du 6 au 13 août 2016 au château Grésillon

Une semaine de découverte, d'étude et de pratique de l'espéranto dans une ambiance internationale et avec des professeurs expérimentés :



Marion QUENUT
(France)



Christophe CHAZAREIN
(France)



Przemek WIERZBOWSKI
(Pologne)



Tim MORLEY
(Royaume-Uni)



Mikaelo BRONSTEIN
(Russie)

inscrivez-vous dès maintenant !

plus d'info sur gresillon.org




Ŝtudperiodoj

PLUEZEK-ESPERANTO

Association loi de 1901
5, Hent Toul Broc'h
22470 PLOUEZEC
Site : www.pluezek-esperanto.net
Blog : esperanto.over-blog.net

20 aj INTERNACIAJ PLUEZEKAJ RENKONTIĜOJ 13 –19 aŭgusto



Programo 2016

(lastminute povus okazi kelkaj ŝanĝoj)

Sabate posttagmeze : kelta bando tra la vilaĝo

Matene 9a – 12a : Kursoj

A infanoj, junuloj :	Michel Dechy (Francio)
B unua nivelo :	Caude Jaussions (Francio)
C dua nivelo :	Jean-Luc Kristos (Francio)
	Anne Jaussions (Francio)
D tria nivelo (babilado):	Murat Osadchuck (Turkio)
	Mikaël Bronstejn (Rusio)
E kelta kulturo	Bill Chapman

Posttagmeze 14a – 16a30 : Turismo

Piede aŭ aŭte en la ĉirkaŭaĵoj
la klifoj, la muelilo de Kraka, la Templo de Lanleff,
la Abatejo de Bopor...

Posttagmeze 17a -19a : Atelieroj

Teatro :	Laurent Peuch
Jogo :	Marie Savary
Informadiko :	Pierre Cardona
Keltaj desegnoj :	Jeannine Royou
Kantoj :	Zdravka Lepneveu
Origamo :	Larysa Osadchuk

Vespere 20a – 22a : diversaj aranĝoj

Dimanĉe :	teatro de Esperanto Vannes
Lunde :	Bretonaj dancoj
Marde :	Prelego (Rusio)
Merkrede :	Tutmondaj kantoj
Ĵaŭde :	Interkant' koncerto kaj infana teatro
Vendrede :	Fest Noz

Merkredo je la 9a30 : ekskurso al Belle-Isle-en-Terre,
Carnoët, pikniko kaj vizito de la valo de sanktuloj

VIZITU niajn reton www.pluezek-esperanto.net
kaj blogon : www.esperanto.over-blog.net



TUTA KALENDARO/AGENDO Gresillon

- 2016-apr-03/08 : Tagoj de laboremaj volontuloj
2016-apr-08/16 : PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović, Christophe Chazarein, Marion Quenut: www.gresillon.org/printemps
2016-apr-15/16 : PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj

- 2016-apr-16/20 : Tagoj de laboremaj volontuloj
2016-apr-20/24 : Korusa renkonto de Interkant' kun Maja kaj Zdravka www.gresillon.org/koruso
2016-apr-20/24 : Krajon'-Ankro, verki sian propran viv-sperton kun Isabelle Nicolas
2016-apr-24/maj-01 : Staĝo artista franclingva kun atelieroj teatra, skriba, kanta, skulpta
2016-jun-01/08 : Semajno pri paco franclingva kun atelieroj de skribado, teatro, konferencoj, spektaklo
2016-jun-4/5 : Membrokunveno ĝenerala kaj komitatkunveno
2016-jun-12/17 : La Luaro laŭ la vortoj. Gloraj verkistoj kaj la kasteloj de la Luaro. Kultura kaj turisma semajno kun Catherine Kremer: www.gresillon.org/s1
2016-jul-04/15 : Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto kun Christian Rivière, Janine Dumoulin. Komparstudo de la tempo-problemo inter ambaŭ lingvoj: www.gresillon.org/s2
2016-jul-04/11 : Ferioj - Familioj - Interŝanĝoj reciprokaj de scioj kaj scipovoj. Por francaj asocioj SEL RERS
2016-aŭg-06/13 : SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO kun Mikaelo Bronštejn, Tim Morley, Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut: www.gresillon.org/s3
2016-aŭg-21/28 : Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj: www.gresillon.org/s4

Agendo 2016

23 avril

Lasta Eo Sabato en Vannes

20 au 24 avril

Rencontre de la chorale
Interkant'
à
Grésillon.



Dates 2016

- ▶ 08 - 16 avril
- ▶ 12 - 17 juin
- ▶ 04 - 15 juillet
- ▶ 06 - 15 août
- ▶ 8-16 août
- ▶ 21—28 août
- ▶ 22 -29 octobre

espéranto
langue
équitable
France



Eŭromediterranea
kongreso de Esperanto

5a - 8a de majo

Esperanto Kongreso organizata de
Espéranto-Marseille, Espéranto-Provence kaj Espé-
ranto-France,
kun riĉa kultura programo, ekskursoj, ludoj, frandadoj...
Venu kaj ĝuu!

Aliĝu ĉe kongreso2016.esperanto-france.org

22a de majo

HERBIGNAC-ESPERANTO PIKNIKO

12a de junio

PLUEZEC-ESPERANTO PIKNIKO



Velado por
Esperantistoj
Malkovru Ligurion
per vela-boato!
Kvin taga ŝipvo-
jaĝo, de la 1a ĝis
la 5a de junio
2016, tra la Golfo
de Genevo

info@nodobandiera.it

Tutmondaj kongresoj 2016



89^a SAT-kongreso

16a-23a de Julio 2016 Herzberg am Harz

101-a Universala Kongreso en Nitro, Slovakio
23a - 30a de julio

PLUEZEK - ESPERANTO

RENCONTRES 13-19 AOÛT

Plouezec

